

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Februari 1944

32 årg. Nr 2

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## Vi och språkmännen.

Den svenska pressen har en tid visat ett upplammande intresse för världsspråksfrågan. Priset till redaktör Nylén gav en anledning, och meddelandet om två nya världsspråksprojekt, Mondial och Mondal, gav ytterligare stoff.

Vår pressinformation lämnar i en notis i dagens nummer ett summariskt besked om artiklar, som varit synliga i pressen, och vi skulle kunna tillägga några ytterligare och därtill — en betydligt ökad redaktionspost. Esperantisterna ha ryckts med av debatten till den grad, att vi ej ha plats att återge allt eller ens tid att besvara alla frågor. Det är emellertid något för vissa tidningsartiklar och för breven gemensamt, som vi anse oss böra beröra med ett par rader.

I de åsyftade artiklarna klandras esperanto därför, att det — som man anser — inte bygger på språkvetenskaplig grund, och i breven beklagar man sig över, att språkvetenskapsmännen gärna kritisera esperanto, men aldrig vilja studera språket.

Man påpekar från ömse håll alltså, att vi inte ha språkmännen med oss i vårt arbete för det internationella hjälpspråket.

Bortsett från att påståendet, att vi inte ha språkmännen med oss, inte är alldeles sant, pekar det dock på vissa fakta, som äro allvarliga nog. Man skulle tycka att kritik av språkmän, som kritisera utan att känna esperanto, inte kan vara mycket värd, men man får inte bortse från, att de fördomsfulla äro i majoritet, och att man därför måste ta hänsyn till dem för deras stora antals skull. Bakom språkmännen ställer upp sig den stora hären av språkintresserade, som svära på magistrernas ord och dessutom "veta", att ett språk "aldrig kan konstrueras" — det måste "växa fram". Det sista ta de inte från språkvetenskapsmännen utan det ta de ur sin kärlek till språken — och till någon del ur kärleken till och den emellanåt berättigade stoltheten över sina förvärvade språkkunskaper. Språkmännen själva akta sig för den sista känslobetona argumenteringen, ty de veta alltför väl, hur mycket i varje kulturspråk, som är konstruerat och måste vara konstruerat, för att språket överhuvud skall vara användbart i modern tid.

Språkmännen se därför inte med förakt på esperanto, därför att det är konstruerat utan därför, att det inte är konstruerat av en av dem. När de lära känna espe-

ranto bli de antingen dess beundrare eller till den grad bitna av dess geniala enkelhet, att de slå sig ned och konstruera ett nytt hjälpspråk. Esperanto visar vägen för alla sådana konstruktioner i nyare tid. Men av en sådan konstruktion blir aldrig mer än språkförslag, ytterligare ett till de 282, som funnos antecknade vid sekelskiftet. Av alla framlagda språkförslag har endast ett enda blivit ett språk.

Varför i all rimlighets namn misslyckas språkmännen, där esperantos skapare lyckades?

Helt enkelt därför, att de försuttit sin tid. De ha ej velat ta sig an uppgiften. De ha antagligen icke känt behovet av ett internationellt hjälpspråk. Där behovet kändes, där uppstod till sist en man, som gav lösningen. Den bröt sig fram i mödor och bekymmer i en trakt av jorden, där olika folkslag och kulturer blandats om varandra till en Babels förbistring, och det omprövades och utformades av en man som förvisso ägde stora praktiska och teoretiska kunskaper, men först och sist var en man med geni.

Språkmännen och vi andra ha bara att acceptera och konstatera, att doktor Zamenhofs konstruktion håller. Den har på ett halvt sekel av mestadels motgångar blivit det enda existerande internationella hjälpspråket, och ännu har det aldrig misslyckats inom något område av mänskligt liv, där det prövats. Och detta under ett halvsekel, då världen omskapats i en takt som aldrig förr. Esperanto är mera användbart i dag, än det var då det gick ur sin konstruktörs verkstad, och detta utan att en prick är ändrad i dess fundamentala regler. Zamenhofs geni gav oss ett språk, ett levande språk, mäktigt att växa i takt med det liv det skall tjäna.

Men varför beklaga sig då esperantisterna över att de ej få språkmännen helt på sin sida?

Jo, därför att de behöva språkmännen, inte som nykonstruktörer, utan som ledare för dem, som önska studera esperanto. Esperanto är lätt, och man lär sig läsa och skriva det nöjaktigt på ett par månader. Men det får esperantisten inte nöja sig med. Han vill att det skall finnas möjligheter att lära sig läsa det och läsa det vackert och att lära sig skriva det och skriva det elegant, och han vill att det skall finnas möjligheter att lära sig tala det — och att lära sig tala det vackert och elegant.

Språket självt har alla dessa möjligheter, men lärarstaben är ännu för gles. Där finns stora luckor för språkmännen att fylla. De äro välkomna att studera esperanto och att med sina kunskaper utfinna metoder för dess rätta inlärande och för att leda oss igenom de få språksvårigheter, som finnas — även hos esperanto. Man bör betänka, att vårt internationella hjälpspråk skall vara — och också är — anpassat så, att det blir användbart för alla språkområden och främst för de stora språkens områden. Därför kunna särskilt de mindre språkens folk emellanåt finna en och annan detalj däri, som är dem främmande och för vars rätta bemästrande fordras ledningen av en van språklärare. Här ha språkmännen sin plats. När de studera esperanto med insikt om att de studera ett språk, som är lika fast och för den enskilde språkforskaren lika orubbligt som varje nationellt språk, då komma deras kunskaper och färdigheter att ge oss lösningen på de problem, som undervisningen även i esperanto uppställer.

Ett internationellt språk måste vara e t t e n d a. Där om kan ingen tvista. Att därför försöka lancera nya språkförslag är att direkt motarbeta syftet. Redan att låta någon svårighet i esperanto förleda sig till ett ändringsförslag är att göra ett nytt språk och alltså till skada. Vi hälsa språkmännen välkomna till oss som språklärare. Komma de till oss i annat syfte, måste vi — hur beklagligt det än är — visa bort dem.

**Resumo:** La diskuto en la sveda presaro pri la mondlingva demando devigas la redakcion peti lingvistojn kaj lingvointeresulojn unue studi esperanton sammaniere kiel ili studas aliajn lingvojn — t. e. sen ia kaŝita penso plibonigi aŭ iel ŝanĝi ĝin kaj eventuale mem fariĝi novkonstruantoj — kaj poste aliĝi al la laboro metante siajn lingvosociojn al la dispono de la esperanto-movado.

## Kio okazos morgaŭ?

Kio okazos morgaŭ? Kia estonteco aperos? Kiel ni vivos dum tagoj venontaj? Ni demandas kaj provas forigi la kurtenon, kiu malhelpas nin vidi la enhavon de la morgaŭo. Ni volas diveni la enigmon de la estonteco, kaj la solvo dependas de niaj propraj deziroj, kredoj kaj esperoj.

Ni esperantistoj estas regataj de unu sola penso: ni atendegas la tagon de la liberigo, kiam la bariloj, kiuj nun malhelpas nin, falos, kaj kiam ni denove kapablos komuniki kun sambatalantoj en eksterlando.

Ni ne scias, kiam la milito finiĝos, sed ni kredas, ke ni tre baldaŭ ekaŭdos la batojn de la pacosonoriloj.

Tiu momento povas veni kiam ajn. Ĝuste pro tio mi kredas, ke ni devas jam nun fari multajn preparojn, kiuj ni povos elutiligi je paco.

Kion fari? Ni devas kolekti la nun disigitajn fortojn kiel eble plej baldaŭ. Imagu, ke la paco venos dum la unua parto de la nova jaro. Tuj estos nia devo sendi al la amikoj en la tuta mondo inviton pri internacia kunveno kaj pritraktado de komunaj internaciaj problemoj, por ke ni povu eluzi la rimedojn ekzistantajn.

Dank' al la senlaca kaj fidela laboro de la amikoj de IEL la organizacio ne mortis. Ĝi ekzistas, kaj ĝia fundamento estas pli firma ol iam antaŭe.

Sed pri la estonteco ni devas diskuti kaj fari komunajn decidojn. Do ni kunvenu. Kie? En Svedujo. En la suda parto, facile atingebla, do en Malmö, kie nia anaro estas sperta kaj kapabla fari la necesajn aranĝojn.

Malgranda kongreso internacia estas aranĝota. Ĝi havu partoprenantojn el kiel eble plej multaj landoj. Ni kolektiĝu por plani.

Sed tia kunveno kostos sufiĉe multe da mono, kaj ni bone scias, ke la samideanoj multe suferis pro la milito. Ili multon perdis, eble ĉion. Ili ne kapablos mem elspezi la necesan monon por vojaĝo kaj vivtenado. Kiel ili povos veturi al la sveda oazo?

La respondo estas unu: Ni devas helpi la reprezentantojn, kiuj ne mem povos havigi la monon. Tial ni jam nun ekkolektu la kapitalon.

Neniu fariĝas monhavulo pere de esperanto. Fojon post fojo ni estas admonitaj sendi kronojn por diversaj celoj. La movado estas malriĉa. Ni komprenis la neces-

## Ne perdu la kuraĝon!

"Ni povas . . . labori trankvile, ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafaje tre malfacila kaj sendanka; sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj leĝoj de la logiko kaj prudento. Pacience ni semu kaj semu por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton."

Jen kion Zamenhof diris en la jaro 1910, sed ĉu ne multaj el ni malatentas la konsilojn, kiujn Zamenhof de tempo al tempo donis al siaj disĉiploj? Kiom ofte ni plendas pro la malrapida progreso de la lingvo. Tre granda nombro da esperantistoj pro tiu kialo perdis la intereson kaj turnis la dorson al la esp.-movado. La malfacila kaj sendanka laboro por Esperanto postulis tro multe da persistemo kaj entuziasmo de la disĉiploj. Ili atendis rapidan kaj brilantan sukceson en la laboro, sed anstataŭe venis malsukcesoj . . .!

La malsukcesoj tamen spronu nin al novaj klopodoj por atingi la celon. Ni celu ĉiam antaŭen malgraŭ la bariloj kaj malfacilaĵoj, kiujn ni renkontas sur nia vojo. Progreso estas vivo, stagnacio estas morto! Rekte kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan! Ni memoru, ke ne ĉiam eblas al semanto mem rikolti tion, kion li semas, sed tamen estas la rikolto, kiu en la malproksimo logaperas . . .!

Ankaŭ ni esperantistoj ja deziras rikolti tion, kion ni semis. Jes, ĉiu el ni deziras transvivi la finan venkon de la lingvo, sed eĉ, se tio ne eblas ni kuraĝe kaj optimiste daŭrigu nian laboron!

La verda armeo en la lastaj jaroj perdis multajn soldatojn, kiuj perdis la intereson, ĉar la milito izoligis nin de niaj eksterlandaj samideanoj. La esp.-movado ja baziĝas sur tutmonda kunlaborado kaj la milito do detruis la fundamenton de nia agado. Ne eblas plu utiligi la lingvon kiel antaŭe. Ni ne povas logi novajn adeptojn, kiam ni ne povas doni al ili konkretajn pruvojn pri la taŭgeco de la lingvo.

Kion ni do faru? Ĉu ni tute ĉesigu la propagandon? Ne, malgraŭ ĉio ni tamen propagandu eĉ pli energie ol antaŭe! Ni preparu nin al la paco kiu nun ŝajnas pli atingebla. Feliĉe nia lando ankoraŭ restas ekster la terura milito. Niaj esp.-organizoj ne frakasigis aŭ malfondiĝis kiel en multaj aliaj landoj. Ni do devas iel montri nian dankon pro tiu favoro kaj tion ni faru per interesigita agado por la lingvo. Antaŭ ĉio ni aktivigu la malnovajn esperantistojn. Ni faru ĉion eblan por reakiri la pozicion, kiun nia movado iam atingis dank' al fervora kaj sindona laborado de niaj pioniroj. En la estonteco ni ankaŭ agu pli prudente ol en la pasinteco, kiam ni forgesis, ke unueco estas forto! Kial ni ne iru kune kaj amike la saman vojon, kiam ni aspiras la saman celon?

E. Hult.

econ oferi sur la altaron de la idealismo. Ĉiu donis laŭ siaj ekonomiaj cirkonstancoj.

Nun ni staras antaŭ granda kaj grava tasko. Ni devas helpi esperanton denove ekfunkcii.

Favora sorto ŝirmis nin ĝis nun. Nia devo estas sunklara: Ĉiu donu laŭ sia povo! Kaj ni ĉiuj donu konsciante, ke esperanto atendas, ke ĉiu faru sian devon.

Einar Dähl.

\*

Jen propono, kiun niaj kluboj devas meti sur siajn programojn kaj serioze diskuti.

**KOM IHAG** att skaffa Dig "Nylén-boken" nu, medan den finns att få! 2 kr. (plus porto och oms.) kostar den bara.

## Norda Literaturo.

Kolekto de literaturaj verkoj el Norda Eŭropo.

Noveloj el latva kaj estona lingvoj. 84 paĝoj.

Prezo kr. 1:15 inkl. imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 698, Stockholm 1. Poŝtgiro 578.



## En av Sveriges allra äldsta Esperantister.

L. P. Hansander, Brunflo.

Med anledning av att Stockholms Fredsförening tilldelat undertecknad sitt världsspråkspris, erhöj jag ett vänligt lyckönskingsbrev från en för mig hittills obekant person i Brunflo i Jämtland, L. P. Hansander, som tecknade sig f. d. hemmansägare. Detta ledde till en högst intressant brevväxling med nya inblickar i esperantos allra första tid i Sverige.

Det var en notis i tidningen Vårt Land före jul 1889 eller på vintern 1890 som riktade hans uppmärksamhet på esperanto. Han rekvirerade från Warschau den därstädes förstnämnda år tryckta svenska läroboken av Henric Lundqvist. Hansander värvade sin ungdomsvän Östersundsstudenten B. G. Jonsson, sedermera känd som redaktör Siösteen, för esperanto, och denne utförde så en svensk översättning av Zamenhofs tyska lärobok, vilken utgavs av den nybildade Upsala esperantoförening.

Bland åtskilligt annat berättar hr H. om den polske författaren Josef Wazniewskis, den förste esperantoturistens, besök hos Siösteen i Östersund under sin esperantofärd genom Östersjöprovinserna, Finland och Sverige. W. beskrev resan i en polsk tidning, och Siösteen fick en redogörelse av beskrivningen och ett tack. Ryska censuren hade emellertid strängt nagelfarit artikeln. Sålunda hade den strukit "Karolinernas och Gustavianernas land" samt uttrycket: "Den svenska maten är mycket god", vilket ansågs som en förklenande jämförelse!

Hr H:s personalia äro också högeligen intressanta. Fadern var riksdagsman Hans Andersson på Jämtlandsbänken, jordbrukare i likhet med sina förfäder ända sedan början av 1400-talet och som ansåg jordbruket som den förnämsta av alla sysselsättningar. Yngst av sex syskon har hr H. själv sex barn och har varit en verksam sockenpamp, tills han 72-årig drog sig tillbaka 1942, fortfarande vid bästa hälsa och vigör.

Att han bevarar sin första kärlek till esperanto, bevisas av lyckönsknigen.

Paul Nylén.

## Ĉu vi volas koni vian landon?

Aĉetu do:

**Stockholm**, 32-paĝa broŝuro kun multaj ilustraĵoj.

**Vermlando**, 32 paĝoj, priskriboj de la plej belaj lokoj en la fama provinco. Belaj fotografajoj.

**Lappland**. Plej norda Svedlando kaj Norvegujo. Kun esperantistoj sur Gotland kaj dana Selando. Ilustrita.

**Uppsala**. La priskribo pri tiu urbo, unu el niaj plej malnovaj, estas interesa kaj bele ilustrita.

Prezo por ĉiuj kvar entute inkl. imposto kaj afranko kr. 1:25.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO  
Fako 698, Stockholm 1. Poŝtgiro 578.

## LINGVAJ DEMANDOJ

Respondo al G. A. Nygård.

-io kaj -ujo estas malsamsignifaj finaĵoj. -io estas landnomfinaĵo, kiam la landnomo ne devenas de la loĝantaro. Ekz. Belgio. Ĝi ne estas loĝata de belgoj, ĉar tia popolo ne ekzistas. Ĝi estas loĝata de valonoj en la suda parto, kaj de flandroj en la norda parto. Same estas al Aŭstrio. Ĝi ne estas (estis) loĝata de aŭstroj (kiu popolo estas tiel nomata?), sed de aŭstrianoj. Ili estas germanoj, kiuj loĝas (loĝis) en aparta oriente kuŝanta lando, tial Oesterrich svede Österrike.

En Latin-Ameriko estas multaj landoj, kies oficialaj nomoj finiĝas -io, ekz.: Meksikio, Bolivio, Ĉilio, sed tiujn landojn kulturis hispanoj.

En Svedio loĝas svedanoj, dum en Svedujo loĝas svedoj. Svedoj kaj gotoj interbatalis, kaj venkis la svedoj, kaj tial ili povis doni sian nomon al la lando, tial Svedujo.

Ankaŭ aliaj lingvoj uzas saman formon kiel nia -ujo, ekz. la hungaroj: Sved = svedo, Svédorszàg = Svedujo; japan = japan, Japànorszàg = Japanujo.

Vivu Svedujo, la lando de la svedoj.

Albin Johansson.

### Suomujo anstataŭ Finnlando!

Mi tre bedaŭras, se oni kredas, ke mian proponon diktis naciaj aŭ eĉ ŝovinistaj motivoj. La motivoj estas ekskluzive p r a k t i k a j.

Kiam parokestro, sro Karl Petersen-Vardø per sia letero de 18/1 1940 al la Esperanto-Asocio de Finnlando kaj al mi kiel ĉefdelegito de IEL faris la proponon, ke oni ekuzu internacie "Suomujo"n anstataŭ "Finnlando", mi respondis al li, ke ne estas konvene, ke ni suomoj propagandu la suomlingvan nomon por nia lando. Tio efikus ŝovinite. Kaj laŭ mia opinio tiama nomo "Suomujo" ne estis sufiĉe internacia, kvankam mi jam tiam sciis, ke dum nia vintra milito tre multaj nacioj ekuzis en siaj gazetoj nialingvan nomon "Suomi" por nia lando kaj ĝi do komencis fariĝi internacie relative konata nomo. Mi aldonis, ke pli decus, se la amikoj de la formo "Suomujo" eksterlande ekpropagandus la novan nomon.

Mi proponis, ke li turnu sin al iu samideano germana, lingvisto pri suomo-ugraj lingvoj kaj unue sufiĉe zorge pritraktu la aferon kun tiu lingvoeksperto, kiu en sia korespondo kun mi jam antaŭe kelkajn jarojn uzis formojn suomo, suoma kaj Suomujo. Mi tamen en tiu korespondo restis fidela al la ĝisnuna internacia uzo.

En sia sama letero s-ro Pedersen ankaŭ citas la respondojn de Esperantista Akademio kaj de sro Goldsmith al li pri la afero. Ambaŭ ili konsentas la malfacilaĵon de duobla "n". La sekretario de la Akademio skribas aldone interalie: "Ili — La Akademio kaj la Lingva komitato — nur povas oficialigi novajn radikojn, eventuale flanke de jam ekzistantaj formoj, se la kutima uzado en Esperanto pravigas aŭ postulas tion. Kaj vi ja ne povas diri, ke la formo Suomujo jam estas grandskale uzata. ... Vi do devus unue komenci kvazaŭ fari propagandon por la nomŝanĝo ...". Kaj sro Goldsmith: "Oni ne povas akcepti novan nomon por lando sen la konsento de la enlandanoj. Se la enlandanoj mem konsentos pri nova formo kaj proponos ĝin, ĝi kredeble estus akceptata, same kiel Irano estas nun la nomo por la antaŭa Persujo. Se vi deziras, ke la afero estu pritraktata, unue korespondu pri ĝi kun la Finna Asocio kaj la Finna ĉefdelegito. Se el tiuj fontoj venus la propono, sendube ĝi povus esti facile konsiderata kaj, miaopinie, akceptata."

Tiutempe mi do lasis la aferon.

Poste okazis, ke la suprenomita lingvisto-amiko nun jam du jarojn loĝas en Helsinko. Kun li mi havis multajn okazojn interparoli nian karan Esperanton, precipe dum liaj multtagaj vizitoj ĉe mia hejmo en Somero. Tiam okazis ofte, ke naskiĝis miskomprenoj, eĉ gravaj pro mia uzo de la vorto "finna". Kvankam mi laŭ la naturo de Suoma lingvo tre klare en mia elparolo distingis la vortojn "finna" kaj "fina", la germano aŭdas iliajn sonojn tute egalaj. Ĉar tiuj miskomprenoj fariĝis tre ĝenaj, mi pro p r a k t i k a j kaŭzoj estis devigata uzi kun la germano la formon "suoma". Nun poste mi ekmemoris, ke jam dum mia angla vojaĝo 1939 okazis samspecaj

## VORT-FIGUROJ.

De F. Szilágyi.

La esploro de lingvoj ne estas nur ludo kaj speciale ne tiu de Esperanto, ĉar la evoluo de Esperanto estas io pli okulvidebla, pli kontrolebla ol tiu de la cialingvoj. Mi kredas, ke Tegnér; la lingvosciencisto mencias pri aŭstralnegra gento, en kies lingvo troviĝas nur du numeraloj: unu signifas ki kaj du respondas al la vorto kuko. Oni malfacile povas imagi, ke matematika genio en tiu lingvo povus valorigi. Malfacile oni povus imagi, ke Newton, aŭ Einstein povus naskiĝi en tia lingvoteritorio, kie oni devas esprimi la ciferon 9 laŭ la jena maniero: kuko-kuko-kuko-ki. La lingvo havas pli decidan rolon en la vivo ol ni kredas kaj ĝi decidas pri pli multaj rilatoj de la vivo ol ni scias.

Antaŭ iom da tempo mi havis okazon skribi pri certa speco de la vortoj, kiuj similas al la muzikistoj en la homa vivo. Tiuj vortoj estis la klaso de son-imitaj vortoj. Nun ni ellevu el la granda socio de la vortoj alian specon, kies vivo estas same pli multkolora ol tiu de ĝenerala vort-civitano, t. e. la figur-vortoj, metaforoj, bildaj vortoj, tiuj facilmovaj bohemoj de la vorto-vivo.

Tiu ĉi materialo estas vere pli ol riĉa. Oni diris, ke la lingvo estas granda tombejo de mortintaj metafoso, aŭ ni modifu iomete tiun eldiron, sub la glacio de la parolo sin kaŝas amaso da frostiĝintaj metafoso, kiujn ni povas revidi, se ni forigas, forfandas la glacieron super ili.

Ni komencu per ekzemplo; en poemo de K. Kalocsay "Printempo" ni trovas la jenajn du versojn:

"Nun tiklas petalojn petole la vento —  
Nun tiklas la koron sopiro flugila."

En la du frazoj troviĝas du bildoj, du frazbildoj; la unua parolas pri la vento, kiu tiklas la petalojn, t. e. ke la vento ricevis povon de homo kaj la floro ricevis la rolon de la eksento pri la tiklado. Pri la dua metaforo en la dua frazo ne estas necesa ia analizo. Krom tio troviĝas ankaŭ detalaj metaforoj, ekz. la vorto petole, kiu donas pluan forton al la bildo, la vento ne nur tiklas, do ne nur hazarde tiklas la floron, sed petole, t. e. kun la intenca, personigita volo.

Tiaj bildaj esprimoj amase troviĝas en la literaturo, poezio, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo de la vortoj.

La verda koloro estas unu el la plej kutimaj simboloj de Esperanto. La espero estas verda, la esperantistoj estas verda popolo ktp. Ia sama koloro havas sufiĉe gravan, kvankam ne tiom gravan, rolon en ĉiu nacia

miskomprenoj. Ankaŭ la francoj ne povas distingi inter "finna" kaj "fina". Kaj plej laste — kiel mi jam havis okazon mencii ĉe la tevespermanĝa paroladeto — mi ofte aŭdis ankaŭ la svedojn elparoli la formon "finna" tiel ke ĝi en miaj oreloj aŭdiĝis kiel "fina" kaj du fojojn mi eĉ rimarkigis pri la miskompreno el tio kaŭzita. Kiel skriba formo "finna" estas sufiĉe klara — kvankam kontraŭesperanta, sed en parolo ĝi nepre kaŭzas miskomprenojn.

Post tiuj spertoj mi estas devigata insisti en mia propono. Ĉar nia kara lingvo Esperanto devas esti ne nur simpla, fleksebla kaj belsona, sed ankaŭ sufiĉe preciza en siaj esprimoj.

Mi do petas la amikojn de tiu principo ekuzi la formojn Suomujo, suomo kaj suoma, disvastigi la uzon de ili ĝis kiam ili fariĝos sufiĉe internacie konataj por eventuala oficiala aprobo. Speciale mi direktas ĉi-tiun peton al ĉiuj suoj samideanoj.

Se naskiĝos plua diskuto pri la afero, mi petas, ke oni nepre flankenlasu aliajn krom la praktikajn motivojn. Ĉar aliaj motivoj estas al mi tute fremdaj, mi al ili ne respondos.

Joel Vilkki, Somero.

## Demando al la ekspertoj.

Sur kiu silabo estas la akcento en la oficiala vorto "hura"?

Ebbe Vilborg.

lingvo: oni parolas en diversaj lingvoj pri homo, kiu ne povis atingi la verdan branĉon, oni parolas i. a. pri verdulo (novulo, ne matura homo pro sia noveco) kaj oni parolas pri homo, kiu diras verdajn (t. e. malsaĝajn). La verda koloro havas klaran simblan rolon en la vivo de la vortoj en ĉiuj lingvoj, sed estas interese rimarki, ke tiu simbolo transiras de nuanco al nuanco. La verda simbolo origine ligas sin al la juneco, poste al la ĝojo kaj espero, el la juneco sekvas la simbolo de la nematur-eco kaj de tie estas nur unu paŝo, tiuj okazoj, kiam la vorto verda signifas ion malsaĝan.

Ankaŭ la aliaj koloroj havas ofte tian metaforan rolon; pri tio oni ne devas multe paroli.

Sed ni prenu kelke da ekzemploj el la diversaj teritorioj de la lingvo. Ĉiuj tiuj ekzemploj estas kunmetitaj el almenaŭ du vortoj, mi volonte nomus ilin "esprim-metaforoj" kaj la unuvortajn bildojn per la nomo "metafor-vortoj". Ni prenu unue la unuajn: Oni diras, ke la botelo havas kolon, la kruĉo havas orejon (oni povas paroli tiel ankaŭ en Esperanto, ĉar la bildo estas absolute klara), ni parolas pri la dorso de la seĝo, kapo de la lito, dentoj de la kombilo, (kaj pri la feraj detoj de la tempo). Sed ni diras speciale en Esperanto — kaj ne tute senmotive — ke en S..... (fantazia urbo) la movado ekdormis, aŭ iom pli optimisme kune kun Zamenhof ni diras, ke nia voko flugas de loko al loko. Oni povus plimultigi la ekzemplojn senlime. Oni devas tamen starigi tiujn regulojn. Ni uzu metaforojn libere, sed ni ĉiam pripensu, ĉu la metaforo estas komprenebla por ĉiu, ĉu la bildo estas klara, aŭ ne? Se la bildo estas klara, ni povas trankvile traduki el la nacia lingvo, sed se ĝia senco pro diversaj kaŭzoj estas kaŝita kaj mistera al eksterlandanoj, ni ne traduku ilin laŭvorte kiam ni tradukas ion. Tia ekzemplo estas la sveda proverbo pri la kuko, kiu serĉas sian similulon. Tia proverbo ni vane tradukas, neniu — krom svedoj — povos kompreni, kion ni volas diri. (Mem la proverbo estas traduko de dana proverbo, en kiu tamen ne temas pri kuko, sed pri korvo, sed pro la rimo la sveda lingvo anstataŭis la nigran birdon per bongusta manĝaĵo.)

La metaforoj povas esti klaraj, aŭ kaŝitaj, ili povas esti vigle vivantaj, aŭ frostintaj, mortintaj, kiam ili ne plu estas rekoneblaj je la unua momento, kaj la parolanto ne konscias pri la naturo de la vorto. Klara metaforo troviĝas pli ol multe, por ne trolongigi la artikolon, ni citu nur unu: serpentvojo, kiu klare donas bildon pri la vojo, iranta laŭ la formo de la serpento. Sed la lingvo kaŝas senfinan amason de kaŝitaj metaforoj. Ni citu kelkajn ekzemplojn, rimarkigante, ke malantaŭ de tiuj ĉi esperanto-vortoj staras la estinto de naciaj lingvoj:

Sciuro estas latindevena vorto, kies originala signifo estas ombra vosto.

La vorto fortepiano origine estis multe pli longa termino, kies signifo estas, klavecino, kiu kapablas doni sonojn forte kaj piane (t. e. mallaŭte). (Un klavecino a forte piano.)

Certe vi rimarkis, ke la vorto ĵaluzo kaj ĵaluzio frapante similas unu la alian. Sed oni ĝenerale ne scias, ke sub la vorto ĵaluzio sin kaŝas bildo, aŭ eĉ sceneto. Pensu pri mezepoka itala urbo, en kies mallarĝa strateto vivas juna paro. Kontraŭflanke loĝas juna viro, kiu volonte rigardas en la ĉambron de la juna kaj bela "signorina". La edzo ne estas nur ĵaluzo, sed samtempe inventema. Oni devas eltrovi kurtenon, kiu kaŝas la ĉambron antaŭ scivoluloj, sed samtempe tralasu la radiojn de la suno. Tiel naskiĝas la ĵaluzio kaj tiel naskiĝas la ludema vorto, kaŝante en si la anekdotan karakteron de la vorto.

Mi kredas, ke la vorto ŝipo ne tute sensignife similas al la vorto fiĝo, sed kreiĝis tiel en la ĝermanaj lingvoj laŭ la simileco inter la du konceptoj. (Komparu: ĝermane: Schiff — Fisch, svede: skepp, fisk ktp.) Eĉ en la hungara lingvo, kiu ne apartenas al tiu lingvofamilio la du vortoj havas similecon: fiĝo — hal, ŝipo — hajó.

### Sveda Instruista Esperanto-Federacio

(Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20  
Telefon 14 93 43

Göteborg V  
Postgiro 3 14 30

Torto. Ĉu vi rimarkis, ke la vorto similas al alia vorto: torturo. La kaŭzo: ili ambaŭ devenas el radiko, kiu ekzistas ankaŭ en Esperanto. Tiu radiko estas: tordi. Ambaŭ vortoj havas ion komunan al la radiko tordi. La vorto torto devenas el la konstato, ke oni devas tordi la paston por fari bakajon kaj la vorto torturo ja montras bildon de malpli paca kaj malpli milda tordado (el la inkvizicia tempo), ĉiokaze tiun de homaj membroj. z

Oni povus daŭrigi la ekzemplojn dum tagoj. Sed anstataŭe ni konstata, kiam vivas kaj kiam estas mortinta metaforo. Se la intenco de la bildkreo estas rekonebla, la metaforo vivas, se tiu intenco tute malaperis, la metaforo mortis, aŭ frostis.

Ni rigardu kelkajn gradojn de metafora vivo:

Tute freŝa, esprimkapabla metaforo estas tiu, kiun Julio Baghy uzas en romantitolo: *Verda koro*. Senpere ĝi indikas pri la esperantista sento, samideana koro. Kiam ni diras pri iu, ke li estas vulpo, ni havas ian palan subkonscian bildon de la vulpo, sed tiu ĉi metaforo pri ruzulo ne vivas tiel, kiel la unua. Estas proksimume same pri la abele diligenta sinjorino, la abeloj en tiu metaforo ne aperas tute konkrete, kaj kiam ni diras, ke iu ploris krokodillarmojn, apenaŭ ni pensas pri la krokodilo. En tiu ĉi lasta ekzemplo la metaforo estas preskaŭ mortinta. La vivo de Esperanto estas mallonga, sed dum tiu ĉi mallonga vivo la lingvo jam mortigis metaforon. Tiu ĉi metaforo estas mem la vorto Esperanto, kiu — kiel konate — estis la valorenhava pseudonimo de la Majstro. Sed nun, kiam ni diras la vorton Esperanto, ni tute forgesas, kion enhavas la vorto, ni forgesas, kiel multe da historiaj antaŭaĵoj ligiĝas al tiu ĉi vorto. Kaj ne estas superflue, se ni revivigas tiun ĉi metaforon se ne alie, en la formo de atentigo: Pripensu, kion signifas esence "Esperanto" kaj pripensu en kia medio, en kiu kontrasto de ekstera malriĉo kaj interna riĉo, el kia heroa batalo naskiĝis tiu ĉi vorto.

Kelkfoje oni komencas artikolon iel kaj finas en tute alia maniero.

### Lars i Kuja till Rio de Janeiro.

Ur Dagens Nyheter's Söndagsnummer 30/1 -44 saxa vi följande för oss intressanta notis:

